


Feliĉan novan jaron 1998!

25



INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE
POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ

ILEI

DECEMBRO 1997

N-ro 4 (83)

Pri la lingv'ajo kaj ortografio de juna amiko

Sen pied'notoj ni uzas nur la plej oftajn 1237 vortradikojn. Tiu ĉi vortar'eto: *Esperanto, Minimum szótár* aperis en 1995, kaj estas aĉetebila ĉe la libro-servo de UEA kaj HEA.

Krom-signoj, kiuj helpas komenc'antojn:

Divido-streko(-) troviĝas inter la elementoj de vortkun-metoj, kiam ne mankas fin'ajo, ekzemple: tablo-tuko, el-iri ...

Vertikala strek'eto (') signas mankon de fin'ajo: bild'karto, verd'iĝi ...

Kiam io helpas la rekonon, kiel ekzemple: tuttaga (tt) aŭ la vorto re-venas en la sama artikolo aŭ kiam la vorto estas tre kon'ata jam por komencanto (esperantisto, patrino ...) ni ne uzas kromsignojn.

Vi ofte trovas komojn (,). Ankaŭ per tio ni deziras helpi komencantojn.

1. regufaro de la ĵusta skribo



*Sur la titol'paĝo:
Feliĉo,
grafikaĵo de
17-jara lernantino,
Agnese Halász,
Gimnazio J. Bánvai*

HUNGARIO

25 jaroj

pasis de tiam, kiam aperis la prov'numero de JUNA AMIKO. Al la somera konferenco¹ de ILEI, kiu en 1972 kun-sidis en Maribor, UWE JOACHIM MORITZ prezentis nian projekton² kaj la konferenco decidis pozitive³. Ĉe la Hungara Esperanto-Asocio TIBOR VASKÓ sub-tenis la ideon. Dank' al ili povis, fine, en-korp'iĝi la ideo.

Dum 25 jaroj multaj for-pasis el la tiamaj kun-labor'antoj, sed la ideo restis: doni konvenan leg'ajon jam en la komenco de la lingvo-lern'ado.

Ni ŝuldas grandegan dankon al la dua kaj tria redaktoroj⁴: OLDŘIĤ KNÍĤAL respektive⁵ STEFAN MACGILL. Precipe al la lasta, sen kies sin-dona laboro kiel administr'anto⁶ kune kun PERLO MIELA (Gyöngyi Mézes) JUNA AMIKO certe ne aperus nun en 3000 ekzempleroj⁷ kaj ne atingus leg'antojn de 82 landoj.

Ni forte esperas, ke ĉiuj, kiuj studas aŭ instruas Esperanton povas kaj povos ankoraŭ longe util'igi ĝin. Tio estas kaj restas nia ĉefa celo. Por tio ni atendas ĉies helpon.

Geza Kurucz
redaktoro

1. inter-konsil'iĝo / 2. plano-propono / 3. jese, favore / 4. homo, kiu faras gazeton / 5. la sekva laŭ la antaŭa vico / 6. zorg'anto pri teknikaj aferoj / 7. aparta peco.

En la antaŭa numero ni komencis seŝon pri nia **Manifesto**¹, por doni argumentojn² en la buŝon de la leg'antoj. Tiam ni parolis pri **demokratio**³, kiu ne estas ebla sen lingva egal'eco. Nun ni daŭr'igas la temon, kaj ni parolos al vi pri

MANIFESTO de la ESPERANTO-MOVADO

PRAGO, JULIO 1996

2. TRANS-NACIA EDUKADO

(Originala teksto sur la apuda nigra fono⁴)

Lingvo estas pli ol simpla komunik'ilo. Ĉiu lingvo estas port'anto kaj esprim'ilo de la kulturo de tiu komun'umo, kiu ĝin parolas. Se iu hom'grupo perdias sian lingvon, ĝi baldaŭ perdas ankaŭ sian kulturan ident'econ⁵. Ne hazarde⁶ volas, do, ĉiu etno⁷ nepre konservi sian lingvon. For-falo de la lingvo signifas for-morton de ĉio, kio estis akumul'ita⁸ de la pra-patroj tra longaj jar'centoj. Kiu for-prenas la lingvon, tiu for-prenas la tutan historian pas'int-econ.

Aliflanke, se iu studas fremdan lingvon, tiu al-prop'r'igas ne nur gramatikajn regulojn kaj senvivajn vortojn, sed leg'ante tekstojn en la stud'ata lingvo, vole-nevole li adoptas⁹ ankaŭ la kulturon de la koncerna hom'grupo, nacio. En la lernanto ofte form'iĝas koncepto¹⁰, ke la popolo, kies lingvon li studas, havas superajn kvalitojn. Evidente, li scias ja sen-kompare malpli pri la kulturo de la ceteraj homgrupoj. Pri tio de-longe konscias ĉiuj diktatoroj¹¹ kiuj deziras alligi la sub-ig'itojn per dev'iga instru'ado de la lingvo de la sub-prem'anta etno. Neŭtrala¹² lingvo ne havas malantaŭ si unu-solan komunumon, sekve unu-etnan kulturon. Malantaŭ ĝi staras la tut'hom'ara komunumo kun sia mult-kolora kulturo. Nia lingvo ne povas, do, al-trudi la kulturon de iu grand'potenco. Por ni ne ekzistas pli aŭ malpli valoraj kulturoj. Esperanto edukas al egala respekto al ĉiuj kulturoj kaj etnoj.

Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple, la lerneano kiu studas la anglan lernas pri la kulturo, geografio kaj politiko de la angla-lingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lerneano kiu studas Esperanton lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentigas kiel hejmo.

Ni asertas¹³ ke la edukado per kiu ajn etna lingvo estas ligita al difinita perspektivo¹⁴ pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.

1. esenca verko por la publiko / 2. pruv'iloj por re-bati malĝustan ideon / 3. politika sistemo en kiu ĉiu homo havas egalajn rajtojn / 4. mal-antaŭ-aĵo / 5. sam'eco / 6. hazardo: ne intencita ago / 7. hom'grupo pli-malpli unu'eca / 8. kolekt'ita / 9. al-prop'r'igas / 10. sistemo de ideoj / 11. regn'estro kiu sub-premas / 12. egale serv'anta al ĉiu / 13. el-diri sen duboj / 14. vido antaŭen al fora est'ont'eco

KRISTNASKAJ SENTOJ

En la Krist'ana mondo Krist'nasko estas la plej grava festo. Post longaj, mallumaj vintraj noktoj en la norda hemisfero¹, ĉiu sopire² atendas lumon, varmon kaj printempon. Sed kiel festas la homoj en la suda hemisfero?

Vi trovas ĉi tie du rakontojn, unu el la frosta Svedio, alian el la sunvarma Brazilo. Legu ilin atente!

La 13-an de decembro en ĉiuj svedaj lernejoj kaj infanejoj oni festas Lucion. Tiam blanke vest'ita knabino portas specialan kronon³ kun brul'antaj kandeloj⁴. Ŝin akompanas aliaj blanke vestitaj knabinoj. Ili portas kandelon en la mano. Ofte ankaŭ knaboj en blanka vesto partoprenas. Ili sur-havas specialan ĉapelon kaj portas or'brilan stelon. Ĉiuj kantas la Lucia-kanton (vidu ĝin ĉi-sube). La kutimo estas malnova. Meze de la nigra kaj malvarma vintro oni sopiras je multe da lumo kaj varmo. Lucia estas la port'anto de lumo kaj bono. Ŝi antaŭ-anoncas la baldaŭan kristnaskan feston.



SANKTA LUCIA

*Peze la nokto nun
domojn al-paŝas,
teron for-lasis sun',
ombroj ĝin kaŝas.
Tiam en nokta hor'
pelos mallumon for
Sankta Lucia, Sankta Lucia.*


*Dormas la nokt' en pac',
zumo' flug'ila
tra la ŝilenta spac'
vibras subtila.
Sur nia sojlo' sin
montras la Lum'reĝin',
Sankta Lucia, Sankta Lucia.*

Lisbet Andréasson (Svedio)

Certe multaj el niaj legantoj volonte aŭskultos la rakonton de nia nova brazila kun-labor'anto pri la tiea Krist'nasko. Ne forgesu, ke ĉe ili nun estas varmega somero.

Parencoj kaj ge-amikoj vizitas unu la alian dum kristnaska monato. Homoj, kiuj vivas en mal-proksimaj urboj (eĉ se por tio ili devas vojaĝi du- aŭ kvarmil kilometrojn) ek-veturas por renkonti siajn parencojn dum la festa monato.

Oni ornamas la ĉefajn placojn kaj stratojn de grandaj kaj malgrandaj brazilaj urboj per mult'koloraj kaj diverse grandaj lampoj. En placoj, preĝejoj, vendejoj kaj loĝejoj oni konstruas 'Sanktan Stalon', kiu similas la nask'ig'ejon de Jesuo Kristo: mal-riĉa, mal-komforta, simpla brut'ejo⁹. En la ĉefplacoj de mal-grandaj



urboj pup'teat'ajoj¹⁰ kaj folkloraj¹¹ dancoj estas prezent'ataj. Infanoj kaj plen'kresk'uloj vizitas amuzajn parkojn por sin plezur'igi en karusejoj¹².

Etaj pinoj¹³ aŭ similaj arb'etoj ornam'itaj per arte prepar'itaj rubandoj¹⁴ kaj bril'antaj, lum'antaj bul'etoj pli-bel'igas loĝejojn, ofic'ejojn kaj vendejojn. En la land'ego ekzistas 25 ŝtatoj kaj kvankam neĝas (en junio) nur en tri sudaj el ili, tamen ĉie oni vidas blank'ajojn, kiuj simbolas¹⁵ neĝon, en preskaŭ ĉiuj ornam'ajoj de tiu festa periodo¹⁶.

Parencoj, geamikoj, ge-am'antoj inter-ŝanĝas donacojn, poŝt'kartojn. Estas far'itaj specialaj manĝ'ajoj, kiujn bon'guste konsumas¹⁷ la famili'anoj kune kun la invit'itaj geamikoj en la antaŭ-vespero de Kristnasko, la 24-an de decembro. La infanoj avida¹⁸ atendas la kristnask'tagan matenon, ĉar Sankta Nikolao certe vizitas ilian domon nokte (li en-iras la loĝejon tra la kamen'tubo) kaj donacas al ili ludilojn, dolĉ'ajojn. En sur-strataj budoj¹⁹ oni vendas specialajn sandviĉojn²⁰, pasteĉojn²¹, terpomojn en kovr'ajo el suker'ajo, re-freŝ'ig'ajojn, drink'ajojn, ktp²².

Okaze de Kristnasko la homoj sentas sin pli ĝojaj kaj kontentaj, la urboj montras sin pli belaj. La fonto de tiu feliĉ'ego estas Dio, kiu en tiu tago pruvis al ni sian amon, ĉar Li sendis Kriston kaj la plej gravan mesaĝon²³: **ĉiu homo devas ami ĉiujn aliajn homojn.**

Pekim T.Vaz (Brazilo)

PIED'NOTOJ SUR PAĜO 6

Por la proksima Zamenhof-tago ni rekomendas al vi ellemi la poem'eton¹ de
Edmond Privat, sviso, el-stara esperantisto de nia jar'cento.

SALUTO AL ZAMENHOF

Al ĉiuj popoloj ben'atan² donacon
Vi faris traf'ante la vojon plej bonan:
En korojn de l' homoj ek-semis vi pacon,
Sur lipojn sem'ante la lingvon bel'sonan.

Nun kreskas en mondo spirito hom'ara
Kaj io el via spirito anima
Per ĉiu parolo de lingvo la kara
En koroj ek-floras la vivo sen-lima.

1. vers'ajo / 2. voki por iu dian favoron.

Proverboj

Kion koro portas, vizaĝo raportas¹.

Ĉiu sezono kun sia bel'eco.

Unu floras, alia ploras.

Kiu semas venton, rikoltas fulmo-tondron.

Venas prudento post la ĝusta momento.

Pli bona estas virto² sen oro ol oro sen honoro.

Nin ĉiam ravas³, kion ni ne havas.

Sperta mano ne restas sen pano.

Ne pelu tiun, kiu mem for-kuras.

Pli bone estas re-iri ol perdi la vojon.

Al du sinjoroj sam'tempe oni servi ne povas.

Se vi volas filinon, flatu⁴ la patrinon.

1. doni informon / 2. bon'mora kaj kuraĝa / 3. kapti la koron / 4. voli al iu plaĉi per laŭdaj vortoj.

PIEDNOTOJ DE "KRISTNASKAJ SENTOJ" (paĝoj 4, 5)


1. duon'globo / 2. kun arda deziro / 3. kap'omam'ajo de reĝo / 4. simpla lum'ilo el fadeno kaj gras'ajo de ŝafoj aŭ bovoj / 5. daŭra bru'ado de flug'il'havaj insektoj / 6. re-soni kiel kordo (fadeno de muzik'ilo) / 7. agrabla, milda / 8. mal-supro de pordo / 9. bruto: kvar-pieda dom'besto / 10. pupo: lud'ilo, infano el iu materialo, ofte bele vest'ita / 11. folkloro: popol'arto / 12. amuz'ilo el sid'iloj kiuj rapide rond'iras / 13. ĉiam-verda arbo kun pinglo-folioj / 14. longaj kaj mallarĝaj koloraj strioj el teks'ajo / 15. vekaj ideoj pri io sama ĉe ĉiu homo / 16. temp'ero kiu regule revenas / 17. for-igi per manĝ'ado / 18. kun granda dezir'ego / 19. malgranda por-tempa konstru'ajo / 20. pan'tranc'ajo kun butero, kolbaso, fromaĝo kaj aliaj laŭ gusto / 21. speco de delikata manĝ'ajo / 22. kaj tiel plu / 23. sciigo.

Por esperantistoj la 15-a de Decembro, la naskiĝ'tago de ZAMENHOF estas grava festo. Tiam, tra la tuta mondo, la esperantist'aro re-memoras pri homo aparte nobla¹, kiu de siaj infanaj jaroj volis modeste² servi la homaron per taŭga rimedo por reciproke³ inter-kompren'iĝi. Li frue rimarkis, ke tia rimedo povas fariĝi sole lingvo neŭtrala⁴.

De kelkaj jar'dekoj la 15-a de Decembro estas sam'tempe Tago de Esperanta Libro. Ne hazarde⁵ oni elektis, por tio, la naskiĝ-tagon de ZAMENHOF. Li ĉiam konsciis pri la ekster-ordinara grav'eco de bonaj libroj. Lingvo sen vasta literaturo ne povas esti riĉa. Kaj, ĉar nun-tempe la nombro de la aktivaj⁶ esperantistoj ne estas alta, ĉiu cel'konscia esperantisto devas sub-teni la libro-el-don'adon per aĉeto de almenaŭ unu libro aŭ abono al unu gazeto en Esperanto. Per agoj oni povas helpi plej efike.

Re-ir'ante al ZAMENHOF, notu bone, ke li naskiĝis la 15-an de Decembro 1859 en ne-granda pola urbo Bialistok (:Bjalistok).

Tiam ĝi apartenis al Rusio. Vidu la simplan lignan dom'eton, en kiu naskiĝis kaj vivis 14 jarojn la unua filo de MARKO ZAMENHOF, lingvo-instruisto kaj de ROZALIA SOFER. Ili havis 22 respektive⁷ 20 jarojn.



1. bona en ĉiuj rilatoj / 2. mal-fiere / 3. reciproki: efiki ambaŭ-direkte / 4. justa, prefer'anta nenium / 5. ne-intence / 6. ag'ema / 7. la sekva laŭ antaŭa vico.

FRANCIO



550000 km²;

ĉirkaŭ 60 milionoj da loĝ'antoj;

ĉef'urbo: Paris (Parizo)

Pro sia favora situo¹ Francio profitas² de tri influoj³: atlantika, kontinenta kaj mediteranea. Dank' al ili ĝia historia kaj kultura hered'ajo⁴ estas unu el la plej famaj en la mondo.

GEOGRAFIO

La reliefo⁵ de Francio bone resumas la Eŭropan. Rande staras monto-ĉenoj⁶: en oriento – Alpoj, kies plej alta supro estas la *Monto Blanka* (Mont Blanc, 4807 m) kaj en sudo – *Pireneoj*. Meze de la lando kuŝas esting'iĝ'inta vulkan'aro⁷: la *Centra Montaro*.

Maroj bordas la landon okcidente (*Norda Maro*, *Manika Maro*, *Atlantika Oceano*) kaj sud'oriente (*Mediterranea Maro*). Inter la montoj kaj maroj etend'iĝas vastaj ebenaĵoj taŭgaj por trafiko⁸ kaj terkulturo.



En gazetoj kaj televido oni ofte nomas Francion per la vorto „Heksagono” (ses-angulo), ĉar la mar'bordoj kaj la land'limoj desegnas ses-lateran⁹ poligonon¹⁰, ĉu ne?

La klimato¹¹ en Francio estas plej-parte sub la influo de Atlantika Oceano, do, mal-sek'eta. Someroj estas varmetaj kaj vintroj mildaj. Tamen, en la nord'orienta parto vintro estas pli frosta, dum en la sudo, mediteranea regiono, kie troviĝas *Montpeliero* (Montpellier, UK-urbo en 1998) someroj estas pli sekaj kaj varmaj.

REGISTARO KAJ EKONOMIO¹²

Francio estas demokratia¹³ lando, Respubliko, kiun regas Prezidento kaj du ĉambroj: la Ĉambro de Deputitoj¹⁴ kaj Senato¹⁵.

Post la dua mond'milito (1939-1945) la franca ekonomio rapide prosperis¹⁶. La lando eksportas¹⁷ tritikon¹⁸, estas fame konata pro vinoj kaj fromaĝoj¹⁹ (ĉirkaŭ 400 specoj), pro parfumoj²⁰ kaj aliaj luksaj²¹ varoj²². La Centro de la Virina kudr'arto estas Parizo. Ankaŭ la aŭtomobiloj Re-

nault, Peugeot kaj Citroen estas bone konataj. Kun aliaj eŭropaj landoj Francio konstruas aviadilojn²³ Airbus kaj la raketon²⁴ Ariane, kiu antaŭ ne-longe brile pafis sian 135-an sateliton²⁵ en la kosmon²⁶.

Tamen, nun-tempe, kiel en multaj landoj, sen-labor'eco estas granda problemo. Kun la franca industrio konkuras²⁷ landoj, kies laboristoj ricevas nur tre malgrandan salajron.

TURISMO


„Dolĉa Francio” – diras multaj ekster-land'anoj. Ili ĉefe vizitas Parizon. La *Ejfel'turo* (Tour Eiffel) kaj la *Triumf'arko* (Arc de triomphe) estas la plej konataj monumentoj²⁸. Ankaŭ la kasteloj²⁹ estas famaj kaj ŝat'ataj: Kastelo de *Versailles* (:Versaj), kie vivis *Reĝo Louis XIV* (Ludoviko la 14-a, la „sun'reĝo”), la belegaj kasteloj ĉe la *Luar-valo*



Kastelo de Chenonceau

(Vallée de la Loire). Multaj eksterlandanoj ŝatas rest'adi ĉe la Mediteranea marbordo pro la sun'varma vetero. Tie *Nice* (:Nis) estas unu el la plej konataj urboj.

Ek-de la 17-a jar'cento Francio estas ankaŭ la „lul'ilo³⁰” de artoj kaj kulturo. Multaj verkistoj, pentristoj, skulptistoj, komponistoj... tut'monde estas famaj.



Kastelo de Chaumont

En Francio funkcias du esperantistaj kultur'domoj: Kastelo Grésillon (:Grezijon) en la urbeto Baugé (:Boĝe) kaj Kvinpetalo en la vilaĝo Bouresse (:Bures). Ambaŭ organizas kursojn. Ĉiun jaron, dum la printempaj ferioj, en la kastelo Grésillon okazas Internacia Staĝo por Infanoj.

Ekde la el-dono de la Unua Libro, Francioj interes'igis pri la Internacia Lingvo kaj en 1905, en la urbo Boulogne-sur-mer (Bulonjo ĉe maro) okazis la 1-a

Universala Kongreso (UK) kun d-ro Zamenhof.



La ven'onta kongreso en Montpeliero estos la 5-a en Francio. Ni esperas, ke venos multaj esperantistoj. Francio valoras viziton.

Monique Noël (Francio)

1. sin-trovo, loko
2. frukt'uzi
3. efiko
4. post-morta ricev'ajo de la parencoj
5. formo de supraĵo
6. sin-sekvo de montoj
7. vulkano: fajro-monto
8. mov'igo de vetur'iloj
9. rekto kiu limas geometrian figuron
10. mult'angulo
11. veter'kondiĉoj
12. ordo en la mastr'um'ado de regno
13. egale justa por ĉiu landano
14. elekt'ito por parlamento
15. supera ĉambro en parlamento
16. progresi rapide
17. el-porti produkt'ajojn el lando
18. pan'semo
19. mal-mola lakt'ajo
20. bon'odora akvo
21. ne nepre bezona
22. komerc'ajo
23. flug'masino
24. spac'paf'ajo
25. (arte-far'ita) ĉiel'korpo, kiu ĉirkaŭ-flugadas alian ĉielkorpon
26. ekster-tera spaco
27. peni por akiri antaŭ'econ
28. arta memor'ig'ilo
29. bela luksa dom'ego
30. luli: mov'eti infan'eton por dorm'igi.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

estas por ĉiuj, kiuj instruas Esperanton.

Kvar numeroj jare. Abonu ĉe via landa ILEI-sekciestro


AL LA ESPERANTISTAJ INFANOJ
INFORMO KAJ AL-VOKO

Jen letero skrib'ita de tri knabinoj, kiuj pas'igis unu semajnon en „KVINPETALO”¹:

«Ĉu vi scias, kiel ek-estis la Dom'ido?

Jen tiele. Venis tri knabinoj: franca, hungara kaj rusa, kiuj estis bonaj amikinoj. Ili venis al KVINPETALO kaj trovis mal-plenan dom'eton. Ili ek-havis ideon: fari domon por la infanoj. La knabinoj trovis malnovajn fenestron kaj pordon, kaj helpe de Suzana kaj Georgo ili aranĝis la aferojn, farbis la fenestron kaj la pordon, metis tapiŝon, bret'aron kaj portis multe da libroj kaj ludiloj. Ili desegnis bildojn kaj pend'igis ilin sur la muroj kaj estis mal-ĝojaj, kiam ili devis for-lasi la domon.»

«La tri knabinoj re-venos, ĉar ili estas la patrinoj de la DOMIDO. Suzana kaj Georgo estas la geavoj kaj Vi, infanoj, kiuj ludos en la DOMIDO, estos la gefratoj. Gardu ĝin bone, kaj lasu neniun ofendi² ĝin! Alportu librojn kaj ludilojn, ktp.»



Du el la tri katoj de Kvinpetalo


BONAN LUDON EN LA DOMIDO deziras al vi la tri patrinoj:

Petra (Hungario),

Izabela (Francio),

Maja (Rusio)

KVINPETALO, Aŭgusto 1997




Unu el la kvin petaloj (domoj)

Ĉiujn pliajn informojn petu de:

"la DOMIDO"
KVINPETALO
F-86410 BOURESSE

1. esperantista ripoz'domo en Francio / 2. per ago aŭ vorto fari malutilon al iu.

KONSTRUU FADEN'PUPON¹ STELO-BEBO



① Helpe de tra-vid-ebla papero kopiu² la modelojn³ kaj el-ton-du ilin el kartono⁴.

② Desegnu la ceterajn liniojn: okulojn, ktp (=kaj tiel plu).

③ Kolor'igu la pupon

④ Per dika kudr'ilo tra-boru la 12 tru'etojn.



⑤ Kun-igu brakojn kaj krurojn kun la korpo helpe de paper'najloj aŭ de butonoj kun-kudr'itaj sufiĉe mal-streĉe.

⑥ Per ŝnur'etoj 1 kaj 2 kun-ligu la brakojn kaj poste la krurojn (supraj tru'etoj).



● Alian ŝnureton 3 ligu al ŝnuretoj 1 kaj 2. Aldonu perlon⁵ al la fino de la ŝnureto 3.

1. pupo: lud'ilo hom'forma; bebo: suĉ'infano / 2. fari duan pecon de io / 3. ekzemplo, kiun oni devas sekvi / 4. dika papero / 5. glob'eto tru'ig'ita.



Monique Noël (Francio)

juna amiko
aperas kvar-foje jare
abon'prezoj
por 1998

Tarifo-zono 1:

| | 1-2 ekz. | 3-6 | 7< |
|-----|----------|-----|----|
| NLG | 19 | 15 | 10 |
| SEK | 85 | 65 | 45 |
| FRF | 55 | 45 | 30 |
| GBP | 7 | 5.5 | 4 |
| DM | 17 | 13 | 9 |
| USD | 12 | 9 | 6 |
| AUD | 15 | 11 | 8 |

Tarifo-zono 2: Latin'ameriko

| | | | |
|-----|---|-----|---|
| NLG | 9 | 7 | 5 |
| USD | 6 | 4.5 | 3 |

Tarifo-zono 3: Rusio, ktp.

| | | | |
|-----|-----|-----|-----|
| DM | 6 | 4.5 | 3.5 |
| USD | 5 | 4 | 3 |
| NLG | 7 | 5.5 | 4 |
| HUF | 700 | 550 | 400 |
| IRK | 7 | 5 | 4 |

Tarifo-zono 4: Najbaroj

| | | | |
|-----|-----|-----|-----|
| DM | 4.5 | 3.5 | 2.5 |
| USD | 3.5 | 3 | 2 |
| NLG | 5 | 4 | 3 |
| HUF | 500 | 400 | 300 |
| IRK | 5 | 4 | 3 |

Tarifo-zono 5: Hungario

| | | | |
|-----|-----|-----|-----|
| HUF | 400 | 320 | 250 |
|-----|-----|-----|-----|

Hungara peranto:

Monika Molnár
Ságvári u. 21.
H-9735 CSEPREG

Pli ol 15 ekz. al unu adreso,
petu pli grandan rabaton!



Pri problemoj de abonoj
turnu vin al:
juna amiko
P1.193.

H-1368 BUDAPEST
Hungario

LINGVAJ BAROJ

„Kiu vi estas?” – demandis la vend'ist'ino al knabino kun nigraj okuloj kaj haroj bukraj¹, kiu staris antaŭ ŝi. Anstataŭ respondi la et'ul'ino transdonis paper'foli'eton kaj mon'ujon. La vendistino pakis la aĵojn kaj, fine, demandis:



„Ĉu mi povas doni al vi pec'et-on da kolbaso?”

Ŝi ne volis kredi al la oreloj, kiam ŝi aŭdis: „Ne.”

Post kelkaj tagoj ĉio ripet'igis, la vendistino denove skuis² la kapon. Ŝi estis la unua infano, kiu rifuzis peceton da kolbaso.

Semajn'fine la etulino venis ne sola. Ŝia kun-ulo estis junulo, eble ŝia frato. La vendistino decidis lastan fojon oferti al la knabin'eto peceton da kolbaso. Ŝi diris:

„Mi estas sci'vola, ĉu ankaŭ nun vi diros NE?”

„Certe,” – respondis ŝia frato – „en nia lingvo NE signifas JES!”

El la hungara tradukis: *Petra Smidéliusz* (12-jara knabino)

VERD'ETO

Iam, en la ĝardeno kreskis herb'ero, nom'ata „Verdeto”.

Ĝi estis tim'ema. Apude, lev'igis tre alta abio. La herbero rigardis al ĝi kaj diris:

«Saluton, abio, vi estas tre bela kaj ŝajnas esti tre forta! Mi admiras³ vin.»

La abio rigardis al la parol'into kun super-emo kaj dig-ne⁴ ekparolis:

«Vi pravas. Vi neniam estos tiel alta kiel mi. Vi ne estas bela, sed malalta kaj malforta. Birdoj ne povas grimpi sur vi.»

Verdeto hontis. Ĝi turnis sin al la roz'arbedo⁵, sur kiu pompis⁶ belega ruĝa rozo. Ĝi diris al la floro:

«Bonan tagon, sinjorino Rozo. Vi estas tre bela.»

La rozo estis tre mal-humila kaj respondis jene:

«Vi pravas. Mi estas belega. Mi havas tre belan koloron kaj vi estas nur verda. Mi ne dezirus esti kiel vi.»


La herbero denove hontis kaj

ek-ploris. Subite ĝi aŭdis dolĉan voĉon, kiu diris: «Saluton, Verd-eto!». Verdeto ek-sentis tiklon⁷ ĉe la kruro. Ĝi ĵetis tien rigardon kaj ek-vidis kokcinelon⁸, kiu grimpis sur ĝi supren. Tiam Verd-eto ĉesis plori kaj demandis:

«Kial vi salutis min? Mi estas nek alta, nek forta, nek bela, nek utila!»

«Tut'certe, sed vi estas afabla. Vi ne pikas kiel la rozo aŭ abio. Mi amas vian koloron. Vi lulas⁷ min, kiam la vento blovas. Mi volas esti via amikino.»

Janine MASSON (:Ĵanin Mason)



1. buklo: fasko da ringo-formaj haroj / 2. movi, klini tien kaj reen / 3. havi plezuron pro io tre agrabla / 4. konscia pri tio, ke ĝi meritas respekton / 5. planto kiu dis-branĉ'igas tuj super la tero / 6. bel'ege aspekti / 7. agrabla, delikata tuŝo / 8. ses-pieda insekto kun nigraj punktoj sur ruĝaj flugiloj / 9. delikate movi sur brakoj por dorm'igi.

LA ROM'ANA KALENDARO¹

La tempo estas sen-fina, ĝi havas nek komencon, nek finon. Kun praktikaj celoj oni tamen devas ĝin iel mezuri.

La hom'aro havas diversajn kalendarojn. El ili, sen-dube, la plej vaste uz'ata estas la *romana kalendaro*. Jen ĝia historio.

TEMPO-UNUOJ

La plej evidenta unuo don'iĝis jam por la pra-homo. Tio estas la tago: *de sun'leviĝo ĝis la sekva sunleviĝo* (=unu turniĝo de la ter'globo ĉirkaŭ sia akso²). Ankaŭ la alia, pli granda unuo estas pli-malpli evidenta, t.e.³ la jaro (tempo, en kiu la Tero rond'iras la Sunon). Astronomie⁴ ĝi egalas 365 tagojn 5 horojn 48 minutojn kaj 46.42 sekundojn. Por la

| APRILIO | | | | | | | | | | | | | |
|---------|----|----|----|----|----|----|----|----|--|--|--|--|--|
| 2 | 9 | 16 | 23 | 30 | 6 | 13 | 20 | 27 | | | | | |
| 3 | 10 | 17 | 24 | 31 | 7 | 14 | 21 | 28 | | | | | |
| 4 | 11 | 18 | 25 | | 8 | 15 | 22 | 29 | | | | | |
| 5 | 12 | 19 | 26 | | 9 | 16 | 23 | 30 | | | | | |
| 6 | 13 | 20 | 27 | | 10 | 17 | 24 | | | | | | |
| 7 | 14 | 21 | 28 | | 11 | 18 | 25 | | | | | | |
| 8 | 15 | 22 | 29 | | 12 | 19 | 26 | | | | | | |
| 9 | 16 | 23 | 30 | | 13 | 20 | 27 | | | | | | |
| 10 | 17 | 24 | 31 | | 14 | 21 | 28 | | | | | | |
| 11 | 18 | 25 | | | 15 | 22 | 29 | | | | | | |
| 12 | 19 | 26 | | | 16 | 23 | 30 | | | | | | |
| 13 | 20 | 27 | | | 17 | 24 | | | | | | | |
| 14 | 21 | 28 | | | 18 | 25 | | | | | | | |
| 15 | 22 | 29 | | | 19 | 26 | | | | | | | |
| 16 | 23 | 30 | | | 20 | 27 | | | | | | | |
| 17 | 24 | 31 | | | 21 | 28 | | | | | | | |
| 18 | 25 | | | | 22 | 29 | | | | | | | |
| 19 | 26 | | | | 23 | 30 | | | | | | | |
| 20 | 27 | | | | 24 | | | | | | | | |
| 21 | 28 | | | | 25 | | | | | | | | |
| 22 | 29 | | | | 26 | | | | | | | | |
| 23 | 30 | | | | 27 | | | | | | | | |
| 24 | 31 | | | | 28 | | | | | | | | |
| 25 | | | | | 29 | | | | | | | | |
| 26 | | | | | 30 | | | | | | | | |
| 27 | | | | | 31 | | | | | | | | |
| 28 | | | | | | | | | | | | | |
| 29 | | | | | | | | | | | | | |
| 30 | | | | | | | | | | | | | |
| 31 | | | | | | | | | | | | | |

homo, krom la suno estis grava ankaŭ la *Luno*, kiu rondiras la Teron en 29 tagoj 12 horoj 44 minutoj

kaj 3 sekundoj (tio estas la tempo bezon'ata de plen'luno ĝis la sekva plenluno).

Kiel vi vidas, jaro ne estas entjera⁵ mult'oblo de tagoj aŭ lun'fazoj⁶. Kiel vi vidos, tio kaŭzis kaj ĉiam ankoraŭ kaŭzas problemojn. Ne malpli arbitra⁷ estas la

ELEKTO DE LA TEMPO-PUNKTO

ek-de kiu oni nombras la jarojn. La praromanoj elektis por si kiel jaron 0 la fondon de Romo (753 a.K.⁸ laŭ la nuna kalendaro).

Komence, ĉe ili jaro havis nur 10 mal-egalajn monatojn (en-tute 304 tagojn). Nur poste, en la 7-a jar'cento a.K. la fama

reĝo *Numa Pompilius* aldonis al la jaro du novajn lun'monatojn: Januaron (de *Janus*, dio de komenco kaj fino) kaj Februaron (*Februus*, dio de sin-pur'igo). La jaro komenc'iĝis per Marto (*Mars*, dio de milito). Pro tio vi trovas en la nomoj de la monatoj: Septem-

| JULIO | | | | | | | | | | | | | |
|-------|----|----|----|----|----|----|----|--|--|--|--|--|--|
| L | 1 | 8 | 15 | 22 | 29 | 6 | 13 | | | | | | |
| Ma | 2 | 9 | 16 | 23 | 30 | 7 | 14 | | | | | | |
| Me | 3 | 10 | 17 | 24 | | 8 | 15 | | | | | | |
| J | 4 | 11 | 18 | 25 | | 9 | 16 | | | | | | |
| V | 5 | 12 | 19 | 26 | | 10 | 17 | | | | | | |
| S | 6 | 13 | 20 | 27 | | 11 | 18 | | | | | | |
| D | 7 | 14 | 21 | 28 | | 12 | 19 | | | | | | |
| | 8 | 15 | 22 | 29 | | 13 | 20 | | | | | | |
| | 9 | 16 | 23 | 30 | | 14 | 21 | | | | | | |
| | 10 | 17 | 24 | | | 15 | 22 | | | | | | |
| | 11 | 18 | 25 | | | 16 | 23 | | | | | | |
| | 12 | 19 | 26 | | | 17 | 24 | | | | | | |
| | 13 | 20 | 27 | | | 18 | 25 | | | | | | |
| | 14 | 21 | 28 | | | 19 | 26 | | | | | | |
| | 15 | 22 | 29 | | | 20 | 27 | | | | | | |
| | 16 | 23 | 30 | | | 21 | 28 | | | | | | |
| | 17 | 24 | | | | 22 | 29 | | | | | | |
| | 18 | 25 | | | | 23 | 30 | | | | | | |
| | 19 | 26 | | | | 24 | | | | | | | |
| | 20 | 27 | | | | 25 | | | | | | | |
| | 21 | 28 | | | | 26 | | | | | | | |
| | 22 | 29 | | | | 27 | | | | | | | |
| | 23 | 30 | | | | 28 | | | | | | | |
| | 24 | | | | | 29 | | | | | | | |
| | 25 | | | | | 30 | | | | | | | |
| | 26 | | | | | 31 | | | | | | | |
| | 27 | | | | | | | | | | | | |
| | 28 | | | | | | | | | | | | |
| | 29 | | | | | | | | | | | | |
| | 30 | | | | | | | | | | | | |
| | 31 | | | | | | | | | | | | |

bro, Oktobro, Novembro, Decembro la numeralojn: sep, ok, naŭ kaj dek, ĉar ili vere estis la sepa, oka, naŭa kaj deka monatoj.

JULIA KALENDARO

Ĉar la lunmonatoj neiel akord'iĝis⁹ kun la jaro kaj ĉar la sezonoj (tre gravaj por la homoj) tute for-ŝov'iĝis, necesis re-


formi la kalendaron. Cetere, ankaŭ la vorto kalendaro venas el la latina, lingvo de la praromanoj. Ili nomis la unuan

tagon de ĉiu monato *calendae* (:kalende).

La reformon en-kondukis en la jaro 46 a.K. la granda imperi'estro¹⁰

| | SEPTEMBRO | OKTOBR |
|----|--------------|----------|
| L | 7 14 21 28 | 5 12 |
| Ma | 1 8 15 22 29 | 6 13 20 |
| Me | 2 9 16 23 30 | 7 14 21 |
| J | 3 10 17 24 | 8 15 22 |
| V | 4 11 18 25 | 9 16 23 |
| S | 5 12 19 26 | 10 17 24 |
| D | 6 13 20 27 | 11 18 25 |
| | 14 21 28 | 12 19 26 |
| | 15 22 29 | 13 20 27 |
| | 16 23 30 | 14 21 28 |
| | 17 24 | 15 22 29 |
| | 18 25 | 16 23 30 |
| | 19 26 | 17 24 |
| | 20 27 | 18 25 |
| | 21 28 | 19 26 |
| | 22 29 | 20 27 |
| | 23 30 | 21 28 |
| | 24 | 22 29 |
| | 25 | 23 30 |
| | 26 | 24 |
| | 27 | 25 |
| | 28 | 26 |
| | 29 | 27 |
| | 30 | 28 |
| | 1 | 29 |
| | 2 | 30 |
| | 3 | 1 |
| | 4 | 2 |
| | 5 | 3 |
| | 6 | 4 |
| | 7 | 5 |
| | 8 | 6 |
| | 9 | 7 |
| | 10 | 8 |
| | 11 | 9 |
| | 12 | 10 |
| | 13 | 11 |
| | 14 | 12 |
| | 15 | 13 |
| | 16 | 14 |
| | 17 | 15 |
| | 18 | 16 |
| | 19 | 17 |
| | 20 | 18 |
| | 21 | 19 |
| | 22 | 20 |
| | 23 | 21 |
| | 24 | 22 |
| | 25 | 23 |
| | 26 | 24 |
| | 27 | 25 |
| | 28 | 26 |
| | 29 | 27 |
| | 30 | 28 |
| | 1 | 29 |
| | 2 | 30 |
| | 3 | 1 |
| | 4 | 2 |
| | 5 | 3 |
| | 6 | 4 |
| | 7 | 5 |
| | 8 | 6 |
| | 9 | 7 |
| | 10 | 8 |
| | 11 | 9 |
| | 12 | 10 |
| | 13 | 11 |
| | 14 | 12 |
| | 15 | 13 |
| | 16 | 14 |
| | 17 | 15 |
| | 18 | 16 |
| | 19 | 17 |
| | 20 | 18 |
| | 21 | 19 |
| | 22 | 20 |
| | 23 | 21 |
| | 24 | 22 |
| | 25 | 23 |
| | 26 | 24 |
| | 27 | 25 |
| | 28 | 26 |
| | 29 | 27 |
| | 30 | 28 |
| | 1 | 29 |
| | 2 | 30 |
| | 3 | 1 |
| | 4 | 2 |
| | 5 | 3 |
| | 6 | 4 |
| | 7 | 5 |
| | 8 | 6 |
| | 9 | 7 |
| | 10 | 8 |
| | 11 | 9 |
| | 12 | 10 |
| | 13 | 11 |
| | 14 | 12 |
| | 15 | 13 |
| | 16 | 14 |
| | 17 | 15 |
| | 18 | 16 |
| | 19 | 17 |
| | 20 | 18 |
| | 21 | 19 |
| | 22 | 20 |
| | 23 | 21 |
| | 24 | 22 |
| | 25 | 23 |
| | 26 | 24 |
| | 27 | 25 |
| | 28 | 26 |
| | 29 | 27 |
| | 30 | 28 |
| | 1 | 29 |
| | 2 | 30 |
| | 3 | 1 |
| | 4 | 2 |
| | 5 | 3 |
| | 6 | 4 |
| | 7 | 5 |
| | 8 | 6 |
| | 9 | 7 |
| | 10 | 8 |
| | 11 | 9 |
| | 12 | 10 |
| | 13 | 11 |
| | 14 | 12 |
| | 15 | 13 |
| | 16 | 14 |
| | 17 | 15 |
| | 18 | 16 |
| | 19 | 17 |
| | 20 | 18 |
| | 21 | 19 |
| | 22 | 20 |
| | 23 | 21 |
| | 24 | 22 |
| | 25 | 23 |
| | 26 | 24 |
| | 27 | 25 |
| | 28 | 26 |
| | 29 | 27 |
| | 30 | 28 |
| | 1 | 29 |
| | 2 | 30 |
| | 3 | 1 |
| | 4 | 2 |
| | 5 | 3 |
| | 6 | 4 |
| | 7 | 5 |
| | 8 | 6 |
| | 9 | 7 |
| | 10 | 8 |
| | 11 | 9 |
| | 12 | 10 |
| | 13 | 11 |
| | 14 | 12 |
| | 15 | 13 |
| | 16 | 14 |
| | 17 | 15 |
| | 18 | 16 |
| | 19 | 17 |
| | 20 | 18 |
| | 21 | 19 |
| | 22 | 20 |
| | 23 | 21 |
| | 24 | 22 |
| | 25 | 23 |
| | 26 | 24 |
| | 27 | 25 |
| | 28 | 26 |
| | 29 | 27 |
| | 30 | 28 |
| | 1 | 29 |
| | 2 | 30 |
| | 3 | 1 |
| | 4 | 2 |
| | 5 | 3 |
| | 6 | 4 |
| | 7 | 5 |
| | 8 | 6 |
| | 9 | 7 |
| | 10 | 8 |
| | 11 | 9 |
| | 12 | 10 |
| | 13 | 11 |
| | 14 | 12 |
| | 15 | 13 |
| | 16 | 14 |
| | 17 | 15 |
| | 18 | 16 |
| | 19 | 17 |
| | 20 | 18 |
| | 21 | 19 |
| | 22 | 20 |
| | 23 | 21 |
| | 24 | 22 |
| | 25 | 23 |
| | 26 | 24 |
| | 27 | 25 |
| | 28 | 26 |
| | 29 | 27 |
| | 30 | 28 |
| | 1 | 29 |
| | 2 | 30 |
| | 3 | 1 |
| | 4 | 2 |
| | 5 | 3 |
| | 6 | 4 |
| | 7 | 5 |
| | 8 | 6 |
| | 9 | 7 |
| | 10 | 8 |
| | 11 | 9 |
| | 12 | 10 |
| | 13 | 11 |
| | 14 | 12 |
| | 15 | 13 |
| | 16 | 14 |
| | 17 | 15 |
| | 18 | 16 |
| | 19 | 17 |
| | 20 | 18 |
| | 21 | 19 |
| | 22 | 20 |
| | 23 | 21 |
| | 24 | 22 |
| | 25 | 23 |
| | 26 | 24 |
| | 27 | 25 |
| | 28 | 26 |
| | 29 | 27 |
| | 30 | 28 |
| | 1 | 29 |
| | 2 | 30 |
| | 3 | 1 |
| | 4 | 2 |
| | 5 | 3 |
| | 6 | 4 |
| | 7 | 5 |
| | 8 | 6 |
| | 9 | 7 |
| | 10 | 8 |
| | 11 | 9 |
| | 12 | 10 |
| | 13 | 11 |
| | 14 | 12 |
| | 15 | 13 |
| | 16 | 14 |
| | 17 | 15 |
| | 18 | 16 |
| | 19 | 17 |
| | 20 | 18 |
| | 21 | 19 |
| | 22 | 20 |
| | 23 | 21 |
| | 24 | 22 |
| | 25 | 23 |
| | 26 | 24 |
| | 27 | 25 |
| | 28 | 26 |
| | 29 | 27 |
| | 30 | 28 |
| | 1 | 29 |
| | 2 | 30 |
| | 3 | 1 |
| | 4 | 2 |
| | 5 | 3 |
| | 6 | 4 |
| | 7 | 5 |
| | 8 | 6 |
| | 9 | 7 |
| | 10 | 8 |
| | 11 | 9 |
| | 12 | 10 |
| | 13 | 11 |
| | 14 | 12 |
| | 15 | 13 |
| | 16 | 14 |
| | 17 | 15 |
| | 18 | 16 |
| | 19 | 17 |
| | 20 | 18 |
| | 21 | 19 |
| | 22 | 20 |
| | 23 | 21 |
| | 24 | 22 |
| | 25 | 23 |
| | 26 | 24 |
| | 27 | 25 |
| | 28 | 26 |
| | 29 | 27 |
| | 30 | 28 |
| | 1 | 29 |
| | 2 | 30 |
| | 3 | 1 |
| | 4 | 2 |
| | 5 | 3 |
| | 6 | 4 |
| | 7 | 5 |
| | 8 | 6 |
| | 9 | 7 |
| | 10 | 8 |
| | 11 | 9 |
| | 12 | 10 |
| | 13 | 11 |
| | 14 | 12 |
| | 15 | 13 |
| | 16 | 14 |
| | 17 | 15 |
| | 18 | 16 |
| | 19 | 17 |
| | 20 | 18 |
| | 21 | 19 |
| | 22 | 20 |
| | 23 | 21 |
| | 24 | 22 |
| | 25 | 23 |
| | 26 | 24 |
| | 27 | 25 |
| | 28 | 26 |
| | 29 | 27 |
| | 30 | 28 |
| | 1 | 29 |
| | 2 | 30 |
| | 3 | 1 |
| | 4 | 2 |
| | 5 | 3 |
| | 6 | 4 |
| | 7 | 5 |
| | 8 | 6 |
| | 9 | 7 |
| | 10 | 8 |
| | 11 | 9 |
| | 12 | 10 |
| | 13 | 11 |
| | 14 | 12 |
| | 15 | 13 |
| | 16 | 14 |
| | 17 | 15 |
| | 18 | 16 |
| | 19 | 17 |
| | 20 | 18 |
| | 21 | 19 |
| | 22 | 20 |
| | 23 | 21 |
| | 24 | 22 |
| | 25 | 23 |
| | 26 | 24 |
| | 27 | 25 |
| | 28 | 26 |
| | 29 | 27 |
| | 30 | 28 |
| | 1 | 29 |
| | 2 | 30 |
| | 3 | 1 |
| | 4 | 2 |
| | 5 | 3 |
| | 6 | 4 |
| | 7 | 5 |
| | 8 | 6 |
| | 9 | 7 |
| | 10 | 8 |
| | 11 | 9 |
| | 12 | 10 |
| | 13 | 11 |
| | 14 | 12 |
| | 15 | 13 |
| | 16 | 14 |
| | 17 | 15 |
| | 18 | 16 |
| | 19 | 17 |
| | 20 | 18 |
| | 21 | 19 |
| | 22 | 20 |
| | 23 | 21 |
| | 24 | 22 |
| | 25 | 23 |
| | 26 | 24 |
| | 27 | 25 |
| | 28 | 26 |
| | 29 | 27 |
| | 30 | 28 |
| | 1 | 29 |
| | 2 | 30 |
| | 3 | 1 |
| | 4 | 2 |
| | 5 | 3 |
| | 6 | 4 |
| | 7 | 5 |
| | 8 | 6 |
| | 9 | 7 |
| | 10 | 8 |
| | 11 | 9 |
| | 12 | 10 |
| | 13 | 11 |
| | 14 | 12 |
| | 15 | 13 |
| | 16 | 14 |
| | 17 | 15 |
| | 18 | 16 |
| | 19 | 17 |
| | 20 | 18 |
| | 21 | 19 |
| | 22 | 20 |
| | 23 | 21 |
| | 24 | 22 |
| | 25 | 23 |
| | 26 | 24 |
| | 27 | 25 |
| | 28 | 26 |
| | 29 | 27 |
| | 30 | 28 |
| | 1 | 29 |
| | 2 | 30 |
| | 3 | 1 |
| | 4 | 2 |
| | 5 | 3 |
| | 6 | 4 |
| | 7 | 5 |
| | 8 | 6 |
| | 9 | 7 |
| | 10 | 8 |
| | 11 | 9 |
| | 12 | 10 |
| | 13 | 11 |
| | 14 | 12 |
| | 15 | 13 |
| | 16 | 14 |
| | 17 | 15 |
| | 18 | 16 |
| | 19 | 17 |
| | 20 | 18 |
| | 21 | 19 |
| | 22 | 20 |
| | 23 | 21 |
| | 24 | 22 |
| | 25 | 23 |
| | 26 | 24 |
| | 27 | 25 |
| | 28 | 2 |

Horizontale skribu vortojn, kiuj signifas:



1. Mez'epoka bel'ega dom'ego
2. Poste-ul'aro
3. Antikva vazo, uz'ata, ekzemple, ĉe voĉ'don'ado
4. Per tio oni fiksas tabulojn aŭ bildojn sur muro
5. Ĉiuj ejoj en domo sur la sama nivelo
6. Ago de tiu, kiu sur-tabl'igas manĝaĵojn por gasto
7. Ne-ating'ebla perfekt'eco
8. Nia „hejma” stelo
9. Unu-iĝo de kelkaj homoj kun sama intereso
10. Krist'naska aŭ nov'jara arbo
11. La sesa planedo de la Suno

Kaj jen la tasko: La unuaj literoj de la vortoj, leg'ataj de supre malsupren, kaj la triaj, legataj de malsupre supren, donas al vi proverbon. Sendu ĝin sur poŝtkarto al la supra adreso ĝis la 1-a de marto 1998. Ni premios la unuajn ĝustajn solvojn.

Solvo de la enigmo „Kiu estas kiu” (paĝo 14 de la antaŭa numero, 97/3):

Fakto Ĉ: Arturo estas apud ③, do li estas ② aŭ ④.

Fakto F: Arturo ne estas ④, do li estas ②.

Fakto B: ① estas nek Reĝinaldo, nek Olivero.

Fakto E: ① ne estas Keneto (nek Arturo), do ① estas Petro.

Fakto G: La homo apud Petro estas Arturo; do Reĝinaldo estas ③ kaj ④ estas Keneto. Restas nur ⑤, kiu do estas Olivero.

Legu la komenc'literojn de la nomoj de la viroj en la star'vico, kaj vi vidos, ke ili staras en PARKO. La nomojn de solvintoj vi trovas sur paĝo 23. Ni gratulas al ili.

1. jar'kalkul'ilo / 2. rekto, ĉirkaŭ kiu turniĝas rado, ekzemple / 3. t.e. = tio estas / 4. astronomo: fak'ulo pri ĉiel'korpoj; astronomio: scienco pri la ĉielkorpoj / 5. nombro dividebla per 1 sen rest'aĵo / 6. periodaj ŝanĝoj / 7. dependa nur de ies propra volo / 8. a.K. = antaŭ Kristo, p.K. = post Kristo / 9. akordo: harmonio, sinkrono / 10. imperio: grand'ega regno / 11. konfuzi: mal-ord'igi / 12. estro de la rom'katolika eklezio / 13. plano propon'ita por real'igo / 14. mond'organiz'aĵo antaŭ UN (=Unu-iĝ'intaj Nacioj)

Ni kolektis aron da vortoj kun la radiko *vid-*.

Eble, vi trovos kelkajn el ili interesaj aŭ ne-kon'ataj. Ellernu ilin.

VIDI - VIDI - VIDI - VIDI - VIDI - VIDI - VIDI - VIDI

| | |
|---------------|--|
| ek vid i | Li <i>ekvidis</i> la lumon en 1986. |
| re vid i | Ĉis <i>revido</i> en printempo. |
| vid iĝi | Tra la ŝir'aĵo <i>vidiĝas</i> lia ventro. |
| vid igi | Televido <i>vidigas</i> al ni forajn okaz'aĵojn. |
| vid aĵo | Jen bild'kartoĵ kun <i>vidaĵoj</i> de Adelajdo. |
| antaŭ vid i | Neniu <i>antaŭvidas</i> la est'ont'econ. |
| vid bendo | Mi registris la programon sur <i>vidbendo</i> . |
| bel vid ejo | Sur la monto-pinto staras <i>belvidejo</i> . |
| unua vid e | <i>Unuavide</i> multaj eraras. |
| ĉio vid a | Nur la <i>ĉiovida</i> Dio povas decidi. |
| akra vid a | Li estas <i>akrvida</i> junulo. |
| preter vid i | Bedaŭrinde, ni <i>pretervidis</i> kelkajn erarojn. |
| vid-al- vid e | Bela arbo staras vid-al-vide al nia en'ir'ejo. |
| ne vid ebla | Li el-iris kaj fariĝis <i>nevidebla</i> . |
| ne vid ate | Li el-iris <i>nevidate</i> . |
| tra vid i | Ŝia bluzo estas <i>travidebla</i> . |
| vid ama | <i>Vidamo</i> pelas nin al foraj landoj. |
| vid maniero | Ĉio de-pendas de la <i>vidmaniero</i> . |
| vid ebl'igi | Mikroskopo <i>videbligas</i> molekulojn. |
| vid ind'aĵo | Ni rigardis la <i>vidindaĵojn</i> de la urbo. |
| el vid o | Jen balkono kun <i>elvido</i> al la maro. |
| laŭ vid e | <i>Laŭvide</i> ĉio iris glate. |
| ne vid anto | Helpu al <i>nevidanto</i> trans-iri la straton. |
| nigra vid ulo | Ne estu <i>nigravidulo</i> (=pesimisto). |
| vid organo | Okulo estas <i>vidorgano</i> . |

Ĉu vi povus kolekti tiajn vort'grupojn? Sendu ilin al nia adreso!



AKVO VALORAS ORO

Ĉu vi scias ke pli ol 70% de la homa korpo konsistas el akvo?

„Nur 3% (procentoj) de la tutmonda akv'aro estas sen-sala, kaj 99% de ĝi troviĝas profunde, sub-tere aŭ formas glac'riverojn aŭ glac'montojn. Ĉu tiu malgranda proporcio¹ de la havebla sensala akvo tamen sufiĉus por viv'teni kaj kontent'igi la bezonojn de la homa planedo², se ĝi estus pli egale dis-divid'ita kaj se la nun-tempaj rubaĵkvantoj³ kaj la akvo-poluado⁴ estus for-ig'itaj?”

Ĉi-supre vi legis el-ĉerp'ajon el 'Verda Paco', libro verk'ita de Klaus Lanz (:Lanc) kaj el-don'ita de ne-reg'ist'ara organizo (NRO) Greenpeace (:Grinpis). En la libro la verk'into esploras la prezon de pur'eco, la postulojn de industrioj rilate akvon, ties super-ekspluat'adon kaj la sekvojn de akvo-bar'ajoj. Flu'anta akvo estas al-ir'ebla al malpli ol 20% de la tuta homaro.

Se vi estas bon'sanc'ulo kaj povas akiri ĝin, nepre plonĝu⁵ en la libron por malkovri la simplan veron, nome, ke ni povos konservi la Naturon nur se ni pri-traktas⁶ ĝin simpatie⁷.

Kion ni individue⁸ povas fari por ŝpari tiun 'oron', tiun puran akvon? Se vi havas aliajn ideojn, bon'volu sciigi ilin al nia legant'aro.

Jen miaj sugestoj⁹:

En la hejmo, unue, por pur'igi lav'ot'ajojn elektu bio-degrad'igan¹⁰, "natur'ami-kan" lesivon¹¹. Due, uzu filtr'il'eton¹² en la lavabo¹³ kaj ne verŝu grason en la de-flu'ilon. Trie, instalu¹⁴ akvo-ŝparajn duŝ-ilon¹⁵ kaj for-lav'ilon en la fek'seĝo¹⁶. Antaŭ ol duŝi kaptu la ek-flu'antan akvon en sitelo¹⁷ por uzi ĝin ali'maniere. Kvare, tuj riparu gut'antan kranon!

Jennifer Bishop (Aŭstralio)

1. grand'eco rilate al la tuto/ 2. ĉiel'korpo/ 3. rubaĵo: mal-pur'ajo, for-jet'ind'ajo/ 4. mal-pur'igo de la naturo/ 5. salti en akvon/ 6. zorgi pri iu, io/ 7. kun protekto/ 8. ĉiu homo/ 9. fortaj proponoj kiuj puŝas al ago/ 10. tia, ke ĝi ne venenas la naturon/ 11. kemi'ajo kiu pli-facil'igas lav'adon/ 12. ilo kiu re-tenas mal-util'ajojn/ 13. lav'ujo sur-mura/ 14. star'igi kaj funkciigi ilon/ 15. duŝo: bano sub flu'anta akvo/ 16. ujo sur kiu oni sid'iĝas en neces'ejo/ 17. akv'ujo por ĉirkaŭ 10 litroj.

Se vi trovas aldonajo(j)n...

al ĉi tiu jar'fina numero de *Juna Amiko* (ekstra ekzemplero aŭ inform'ilo), tio ne estas simpla donaco aŭ eraro. Ni petas vin montri, prunti aŭ doni ilin al juna amiko aŭ instruisto kun rekomendo aboni la revuon por 1998 kaj al-iĝi al la monda familio de nia legant'aro. Ĉu vi mem, hazarde, ĝis nun ne forgesis re-aboni? Nun estas la plej ĝusta tempo! Se vi estas preta aktive varbi en via lando, petu de nia administra adreso (vidu ĝin sube) stokon da varb'iloj kun la adreso de via en-landa per-anto.

HOROJ EN JAPANIO

Ĉe japanoj ne nur la jaroj havas besto-nomojn (vidu JA 97/2), sed ankaŭ la horoj (fakte hor'du-opoj) havis bestonomojn ĝis antaŭ 100 jaroj. Nun-tempaj japanoj kutimas dividi tagojn en 2 partojn, nome antaŭ-ĉevalo kaj post-ĉevalo, ekzemple, „La lerneja leciono komenciĝas je la 8-a antaŭĉevalo”, kaj simile: „Ni vesper'manĝos je la 7-a post-ĉevalo”. Nu, vi facile komprenas ke „ĉevalo” estas „tag'mezo”, t.e. la 12-a horo. Kaj tial je la tempo-sonor'ilo de „Nun la ĉevalo!” lernantoj sage flugas al la manĝejo. El la 12 bestoj restis nur la ĉevalo, sed iuj maljunuloj kredas ankoraŭ ke spiritoj kaj fantomoj vagas en tomb'ejoj je la horo de „plena bovo” (2-a horo nokte).

Verkis: *Rinzo Okamura*

Desegnis: *Mami Inoue*



Aperis la DUA KAJERO de *Tendaraj Tagoj* !!!

En nia antaŭa numero vi trovis varbilon, kiu anoncis la revizion de tiu lerno-libro. Post duon'jara laboro, ĵus ĝi aperis kaj estas aĉet'ebla. Ĝi havas grandajn sangojn kompare al la unua el-dono, in-ter-alie, 20 pliajn paĝojn kaj pres'adon per kvar koloroj anstataŭ nur unu. La specialaj prezoj anonc'itaj por diversaj libroj ĝis la 30-a de novembro 1997 plue validas ĝis la 20-a de decembro. Do, unu ekzemplero de TT2 (kun sendo-kostoj): 15 NLG; ek-de 3 ekz. po 11 NLG; ekde 9 — po 8 NLG. Mendu ĉe ILEI, pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

ENKETOLO pri LERNEJA INSTRUADO de ILEI por 1997/98

Karaj gekolegoj, bv. fotokopii la formularon kaj poste tajpi aŭ skribi nigre, klare kaj preslitere nur ene de la kadroj. Uzu apartan folion por ĉiu klaso.
Pliajn informojn skribu sur aparta folio.

Nomo de
la lernejo:

Stratadreso:
Retadreso aŭ telefono:

Poŝtkodo:

Urbo:

Lando:

Nomo de
la instruisto:

Kiom da lernantoj en la kurso?

Meza aĝo

Kiom da minutoj semajne?

Kurssemajnoj jare

Hoku la kvadraton por indiki JES:

Instruisto profesia? Lingvo-instruisto? Dungito de la lernejo?

En oficialaj horoj? Oficiala lerneja studtemo? Ekzameno?

Partopreno deviga post elekto? Partopreno plene deviga?

Lemiloj: nacilingvaj propraj vidbendo Mazi

Tendaraj Tagoj Saluton! Ludu kun ni

Ligoj kun: IĈLM Fundapax. Ricevas: Juna Amiko IPR

Korespondado dezirata? Grupa Individua

La plenigitan enketilon baldaŭ **sendu** al la redakcio de *Juna Amiko*:

GÉZAKURUCZ, Hítel u.10.fszt.16, H-6000 KECSKEMÉT, Hungario

☒ 15-jara lemantino deziras korespondi tut'monde pri ĉiuj temoj. Adreso: *Sanela Zakić*, Nevesinjska 8, YU-24000 Subotica, Jugoslavio.

☒ 10-jaraj gelemantoj deziras korespondi kun la tuta mondo. Ili certe respondos. Skribu: Esperanto-rondo, Szkoła Podstawowa nr 34, ul. Reymonta 69, PL-44-200 Rybnik, Pollando.

☒ 19-jara studento volas korespondi pri ĉiuj temoj tut'monde. Adreso: *Ilja Smikov*, Ostrovskogo 5-86, RUS-357739 Kíslovodsk, Rusio.

☒ Sep 15-23-jaraj gejunuloj deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj eblaj temoj. Leterojn sendu al: Esperanto-Societo Flamo, Pf. 16, PL-87-100 Toruń 1, Pollando.



☒ Kvin 10-jaraj knabinoj korespondus bild'karte kun multaj landoj. Skribu al *Aurelia Sokół*, ul. Lipińska 10 B/5, PL-41 703 Ruda Śl., Pollando.

☒ 21-jara studentino deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi bildkartojn, prospektojn. *Daiva Blauzdyté*, Algirdo 21-18, Panevėžys, Litovio.

Ni preferas aperigi adresojn de junaj legantoj kaj iliaj instruistoj.

SOLVINTOJ de taskoj en antaŭa numero

Trovu la detalojn. Gajnis: Petra Smidéliusz (Hungario), Sanela Zakić (Jugoslavio)
Ciferoj: D. et A. Hubert (Francio)

Kiu estas kiu? Gajnis: Petra Smidéliusz (Hungario), Okumura-Rinzo (Japanio), Alina Sokół (Pollando), Izabela Clopeau, Julia Hedoux (Francio), Marit Boht (Germanio)

juna amiko

Internacia Esperanto-Revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

24-a jaro, n-ro 4 (83), 1997

Aperas 4 fojojn jare.

Redaktoro: *Géza Kurucz* (Hítel u.10.fsz.16, H-6000 Kecskemét, Hungario)

Ret'adreso: bjg@mail.datanet.hu

Abona adreso: Juna amiko, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario

Eldonanto: ILEI, Södra Rörum 455, S-24294 Hörby, Svedio

Lingva revizianto: *André Albault* (Francio)

Kunlaborantoj: *Tatjana Auderskaja* (Ukrainio), *Lisbet* kaj *Bertil Andreasson* (Svedio), *Stefan MacGill* (Hungario), *s-ino Raita Pyhälä* (Finnlando), *s-ino Monique Noël* (Francio), *s-ino Jennifer Bishop* (Aŭstralio), *Baldur Ragnarsson* (Islando), *Gennadij Basov* (Rusio), *Brandhyt Mezini* (Albanio), *Till Dahlenburg* (Germanio), *Rinzo Okumura* (Japanio), *Pekim Tenorio Vaz* (Brazilo), *Zoltán Kurucz* (Hungario); *Dieter Berndt* (Germanio); *Melinda Sántha*, *Monika Molnár* (Hungario), *Pavel Rak* (Ĉeĥio) grafikistoj

Farita en la presejo de handikapuloj en Kőbánya

Basa u. 1., H-1107 BUDAPEST, Hungario

ISSN 0230 1314



FANFARON'ULOJ

„Ĉu vi jam aŭdis pri Atlantiko?”

„Jes.”

„Mi trans-naĝis ĝin!”

„Kaj ĉu vi aŭdis pri la Morta Maro?”

„Jes.”

„Ĝin mort'igis mi!”



ANTAŬ-VIDO

„Onklo Johano, vi sidas en inversa direkto sur la selo.”

„ Ne gravas, kara nevo! Mi tuj revenos.”



STRANGA ARGUMENTO²

Du infanoj inter-parolis:

„Jen vidu, miaj piedoj ne estas tiom mal-puraj, kiom la viaj.”

„Kompreneble, ĉar vi estas tri jarojn pli juna.”

1. Oceano inter Eŭropo kaj Ameriko /
2. konvinka pruvo.